
## *Supren kaj malsupren*




1 ekstrema parto de konstruaĵo
2 granda dancfesto
3 utila insekto donanta mielon
4 granda mambesto en oceano
5 kudrilego, uzata de ledlaborantoj kaj ŝuistoj
6 produkto de ŝafoj por produkti teksaĵojn
7 membro de asocio aŭ movado
8 malgranda besto apud akvo, prognozanta la veteron
9 ŝtato en malfora oriento (Persio)
10 malice moka, akresona rido, grimaco
11 ilo por fiksi ŝipon
12 parto de cirklo, ankaŭ pafilo por sagoj
13 amaso, kolekto de samspecaj objektoj
14 analogforma subtenilo por ordigi objektojn, ekz. sondiskojn, librojn, telerojn
15 poŝtsendaĵo kun ekstera teksto
16 flugobjekto
17 skribmaterialo en la lernejo
18 ilo por kapti fiŝojn
19 malgranda parto de objekto, materialo aŭ ŝtofo

***solvoj de la marta numero*** .
*horizontale:* 1. arab' 4. ide' 6. rara 9. nord' 10. stek' 11. Isar' 13. ost' 15. lupo 17. gardi 19. botoj 20. ilo 21. somer' 24. amo 25. uln' 26. ruĝ' 27. eta 29. admon' 31. oro 33. totem' 35. Afrik' 37. anod' 38. art' 40. Laos' 41. lens' 42. aren' 43. ozon' 44. onj' 45. sold'
vertikale: 1. aligi 2. anaro. 3. boro 4. ido 5. est' 6. relo 7. akuta 8. alojo 12. Saluton 14. sem' 16. Pomerio 18. islam' 19. bruna 22. ond' 23. ero 27. etaĝo 28. atolo 30 mar' 31. Orano 32. oksid' 34. Eden' 36. fles' 38 aso 39. taj'

Kontaktu nin! Gun.Eb@t-online.de +49 3831 490003


# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

**jaro 2007 majo**


Vi ne nomu vin
malariĉa pro la revoj,
kiuj ne plenumis sin.
Malriĉul' estas nur la
nerevant'.

laŭ Marie Ebner-Eschenbach

### Printempa Kredo

La mond' beliĝas je ĉiu tag' ,
ne restas
pri l' estont' imag',
ne estas floradfino.

Ekfloras eĉ plej fora val',
nun ĉesas, kara kor', fatal',
ŝanĝiĝos baldaŭ la destino.

laŭ Ludwig Uhland

**Ni funebras**
**Pro la forpaso de nia longjara klubano**

## Werner Jenzen

**Kiel ni nur nun eksciis Werner forpasis je la 10a de marto. Li atingis la aĝon de 80 jaroj . Bedaŭrinde li post la morto de sia edzino Maria ne plu havis emon kunlabori kaj ni preskaŭ ne havis informojn pri li. Tamen li ĉiam restos en nia memoro.**

## *Novaĵoj*

De la 18. ĝis 21. de aprilo nia grupo partoprenis kadre de UNO-kampanjo « Ok celoj – ok Hanse-urboj » ĉe ekspozicio en la urbodomo de Stralsund. Komune kun aliaj Stralsundaj organizacioj kaj asocio estis raportataj pri aktivitecoj en la "Tria Mondo". Helpe de la geedzoj Nelken el Warstein ni povis prezenti la infan-bienon "Bona Espero". La eksponaĵoj de ĉiuj partoprenantoj montris la elstarajn klopodojn de multaj homoj por helpi al la plejaj malriĉuloj sur la tero.

Bedaŭrinde la intereso de la homoj ne estas alta. La ekspozicio, la aktivecoj de la inform-kontenero kaj de la film-prezentoj preskaŭ ne trovis vizitantojn. Kio estas la kaŭzo? Ĉu la malvarma vetero malhelpis la Stralsundanojn? Ĉu la varbado ne estis sufiĉe subtenita de la urba administrado kaj de la medioj. Aŭ ĉu la homoj entute ne interesiĝas por la zorgoj de la fremdaj popoloj.

## *Reago el Japanio*

Kara S-ro Ebert,

Dank' al viaj kunlaboro por la Virina Tago 2007 en Hiroŝima, ni ricevis 158 mesaĝojn el 50 landoj, kaj ekspoziciitaj de la 3a ĝis la 9a, marto, kaj la 10an en la kunveno kun 330 partoprenantoj. La partoprenantoj ricevis belan broŝuron de la mesaĝoj kun mencio, ke peris ĝin Esp-o tutmonda.

Oni denove ekspozicios la mesaĝojn okaze de pli granda kunveno de virinoj en aprilo, kaj okaze de tutlanda kunveno de la Japana Virina Konferenco en oktobro 2007. Jen, nombroj kaj nomo de landoj de la mesaĝoj:

***El Azio***: 3 el Ĉinio/ 1 Koreio/ 1 Irako/ 2 Nepalo/ 1 Uzbekio/ 4 Irano/ 1 Pakistano/ 4 Israelo/ 1 Tadĵikio/ 3 Vjetnamio/ 1 Mongolio/ 1 Kazaĥio.
***El Oceanio***: 3 Aŭstralio/ 1 Novzelando.
***El Eŭropo***: 3 Islando/ 1 Aŭstrio/ 1 Albanio/ 9 Italio/ 4 Nederlando/ 1 Kroatio/ 4 Svisio/ 7 Belgio/ 1 Slovakio/ 2 Serbio/ 9 Germanio/ 3 Slovenio/ 5 Hungario/ 3 Finnlando/ 26 Francio/ 6 Ĉeĥio/ 1 Rumanio/ 1 Litovio/ 4 Rusio/ 1 Bosnio/ 1 Hispanio/ 3 Bulgario/ 5 Pollando/ 2 Estonio/ 2 Svedio.
***El Nordameriko***: 10 Usono/ 3 Kanado.
***El Latinameriko***: 1 Kubo/ 4 Brazilo/ 1 Peruo/ 1 Argentio.
***El Afriko***: 1 Madagaskaro/ 1 Kamerunio/ 2 Kongo/ 1 Malio/ 1 Niĝerio.

Samideane, OSIOKA Taeko

***Nia venonta kunveno***
Ĉifoje ni renkontiĝos je ĵaŭdo, de la 10a de majo, en Greifswald ĉe Erika Lutzke, Vulkanstr. 13
Gastoj ĉiam estas konvena.